

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-10 sendita el Budapeŝto la 9-an de marto.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

INKluda strategio de UEAviva

Diskuto “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”, kun Margaret Zaleski-Zamenhof kaj aliaj, la 13-an de marto, kun literatura konkursa fono.

Okaze de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK), UEAviva – la kanalo de UEA ĉe YouTube – elsendos la 13-an de marto, sabate, je 15:00 UTC (16:00 CET) la erksperantan diskuton “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”. Dum la forumo la esperantistoj kaj sciencistoj José Antonio Vergara, Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Amri Wandel diskutos pri la pandemio kaj ĝia influo en nia tutmonda socio, de la scienca kaj persona vidpunkto. Nicola Ruggiero, sekretario de INK, prezentos la konkurson, ĝian prezidanton François Lorrain kaj ĝiajn ĵurianojn, kaj respondos al la demandoj de la spektantoj. Paulo Sergio Viana legos novelon, kiu havas la pandemion kiel temon. Chelsea Moses kaj Marisol Soriano partoprenos la diskuton kiel esperantistoj, kiuj lernis la lingvon dum la lasta jaro pro la socia izoliĝo.

Oni povos spekti la diskuton per [UEAviva \(https://youtu.be/j4Y-Yjpb0p0\)](https://youtu.be/j4Y-Yjpb0p0) aŭ rekte per [Zoom \(https://us02web.zoom.us/j/82400415623\)](https://us02web.zoom.us/j/82400415623); pasvorto: "la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj")

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- INK-verŝado
- Horzonozo
- Biblioteka subteno
- Institucio Hodler
-

INK estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj aŭspiciata de UEA. La [lanĉo de INK](https://youtu.be/8g1w_xEdZVU?t=6663) (https://youtu.be/8g1w_xEdZVU?t=6663) okazis en septembro 2020, dum la Printempa Inaŭguro de la Monda Festivalo de Esperanto (Mondafest' 2020): ĝin enkondukis Nicola Ruggiero nome de ALE, Orlando Raola nome de UEA kaj José Antonio Vergara kiel speciala gasto, kiu prezentis vidpunkton de epidemiologo. La limdato por sendi verkojn al INK estas la **20-a de junio 2021**, kaj la gajnintoj estos anoncigitaj dum la 107-a UK en Montrealo, en 2022. Premioj por la gajnintoj estos 500, 300 kaj 200 eŭroj.



La temo de la konkurso estas “KOVIM-19, kiel ĝi ŝanĝis nin?”. Tiu temo estas universala kaj permesas verki pri pasinteco (dum la unuaj monatoj de la pandemio), pri nuntempo (kiam la socio relative alkiutimiĝis aŭ akceptis vivi kun la viruso) aŭ estonteco (post jaroj aŭ jardekoj: kia estos nia mondo?). Anoj de la ĵurio venas el diversaj kontinentoj kaj taksos la novelojn rete.

Aŭtoroj povas sendi novelojn verkitajn originale en Esperanto aŭ verkitajn en iu ajn alia lingvo, kun traduko al Esperanto. Tial INK estas malfermita al ĉiuj aŭtoroj en la

mondo kaj estas okazo konigi Esperanton kaj Esperantan literaturon al la ĝenerala publiko.

Pliaj detaloj pri la konkurso: <https://www.akademio-literatura.org/ink>. Kaj ĝia regularo: <https://www.akademio-literatura.org/ink/regularo>.

Vidu la eventon en Eventa Servo: <https://eventaservo.org/e/1fe88e> kaj Facebook: <https://www.facebook.com/events/339641354114132>

Hor-ore Misagordita Trompo (HMT)

Jen publika servo de la EKO-komunikoj. En kolosa ekzemplo de la malordo kaj manko de kunlaboro, la plimulto de Usono kaj Kanado transiros al la somera tempo en la 14a de marto, inter la 2a kaj 3a horo. Kontraste kaj perverse, la Eŭropa Unio transiros al ilia somera tempo en dimanĉo la 28an, du semajnojn pliposte. Do, la orienta marbordo de Usono transiros de EST al EDT, kaj la eŭropa transformo estos de CET al CEST. Ni bezonas novan normon: UFT (Universale Fuŝita Tempo). Efektive en unu jaro en la 90aj jaroj Ameriko kaj Eŭropo unuecigis la transiran daton, sed tio bezonis tiomajn fortostreĉojn, ke tio neniam ripetiĝis – nek antaŭe, nek poste. Kaj Britio faros tion, kion ĝi volas. Ĉiam ili havas Greniĉan tempon (UTC).

La praktika sekvo de tiu primitiva ekzemplo de rifuzo kunlabori estas, ke miloj da Zom-kunsidoj tra tiu dusemajna misagordo fiaskos, ĉar la partoprenuntoj alvenos horon tro frue aŭ tro malfrue. Aviadilkompanioj devos alverŝi sablon al sia keroseno, por malrapidigi iliajn flugojn, aŭ aldoni raked-brulaĵon por rapidigi aliajn flugojn.



Esperantistoj kaptu la okazon porti inteligentan solvon al tiu kaĉo: klare UEA kaj ILEI devos subteni la enkondukon de ZMT: Zamenhofa Mondunuiga Tempo.

Biblioteka Apogo Bachrich: alvoko 2021

Ĉi-jare UEA disdonos refoje subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne ricevas ŝtatajn, urbajn aŭ aliajn movadajn subvenciojn. La fondaĵo estis starigita en 2014 per komenca kapitalo (20 000 USD) donacita de la familio Bachrich. Per la subvencio eblas aĉeti librojn kaj aliajn varojn ĉe la Libroservo de UEA.

En 2020 estis disdonitaj entute 2163 eŭroj al 18 bibliotekoj en Eŭropo (12 bibliotekoj en Belgio, Germanio, Italio, Francio, Rusio, Bulgario, Hispanio, Ĉeĥio), Ameriko (2 bibliotekoj en Brazilo kaj Argentino) kaj Afriko (4 bibliotekoj en Burundo, Benino kaj Ugando).

Ni invitas subvencipetojn de Esperantaj bibliotekoj tutmonde. Por plenigi vian subvencipeton, bonvolu indiki klare la nomon de la respondeca persono, poŝtan adreson al kiu UEA sendu la pakaĵon kaj detalan priskribon de la biblioteko. Bonvolu ankaŭ aldoni kromajn detalojn, kiujn la doganoj de via lando emus peti por sukcese liveri al vi la pakaĵon (ekz-e retpoŝtadreso, telefonnumeron kaj impostan identigilon de ricevonto). En via komunikado la listo de la mendotaj varoj devas aperi en **tabelo**, kiu nepre havu la jenon ĉekape de la kolumnoj, ekzakte en la indikita ordo:

| Titolo | Kvanto | Baza prezo (€) | Sumo (€) |

Atentu, ke la titolo kaj la baza prezo devas esti entabeligitaj ekzakte kiel ili aperas en la [Katalogo de UEA](#). Nepre uzu la katalogon, kiam vi preparas vian subvencipeton. Malĝuste preparita tabelo multe malpliigos viajn ŝancojn akiri ajnan subvencion. La petoj atingu la Asocion ĝis la **15-a de majo 2021** retpoŝte al bachrich@co.uea.org, kopie al oraola@esperanto.org.

En la pakaĵoj sendotaj ni planas inkluzivi donacetojn por danki vian partoprenon, inter ili la unuan libron publikigitan de UNESKO en Esperanto: *De ideoj al agoj: 70 jaroj de UNESKO*. Okaze de duboj pri la pretigo de subvencipeto, bv. ne heziti kontakti la respondeculojn ĉe la supre indikitaj retadreso.

Institucio Hodler – pli da aliroj por proponi projektojn

En EKO 4 ni prezentis komunikon de la prizorgantoj de Institucio Hodler. Jen pli bonaj alirebloj por akiri pli da informoj pri la kondiĉoj kaj ebloj:

<https://www.uea.org/asocio/Hodler>

<https://www.uea.org/pdf/subvencipeta-formularoIH-v25.doc>

===== vortoj 945 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.